# BOLETIN

## DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

AÑO VII N.° 6 (78) JUNIO, 1955



## LA LLAMADA DE GIJÓN

Por las noticias que van llegando a nuestra redacción, sabemos que en todos los núcleos esperantistas españoles se están haciendo febriles preparativos para asistir en Gijón a nuestro próximo Congreso de Julio. Son varios los puntos donde se organizan caravanas de congresistas, que sentarán una afirmación rotunda de la razón de nuestra idea. Y nuestros camaradas de la comisión organizadora han emprendido una campaña de propaganda en la prensa esperantista del extranjero, que nos induce a suponer que un nutrido contingente de esperantistas de otros países nos honrarán con su presencia como en años anteriores, dando a nuestra reunión ese carácter cosmopolita tan simpático, que aventaja a todas las demás reuniones internacionales, porque la gente entre nosotros se entiende admirablemente sin el recurso de intérpretes ni de aparatos transmisores. El abnegado grupo de

# 16-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

## 23 - 27 de Julio de 1955

Adreso de la Organiza Komitato: Grupo Esperantista del Centro Asturiano
Paseo de Begoña, 26-28, GIJON, Asturias

Post unu semajno jam estos preta la kongresa afiŝo, kiun oni povos mendi ĉe la Organiza Komitato, je la prezo de unu peseto. Oni petas distribui ĉi tiujn afiŝojn sur la plej taŭgajn lokojn por efika propagando.

Ne forgesu, ke ankoraŭ oni povas liveri glumarkojn kaj poŝtkartojn. La unua serio da glumarkoj jam finiĝis, kaj nia Komitato eldonis novan serion kun alia fonkoloro. La poŝtkartoj estas trispecaj: unu, la kongresa poŝtkarto; alia, kun la portreto de Zamenhof, kaj tria poŝtkarto, montranta landkarton de nia lando.

Bonvolu sendi vian aliĝon tuj kaj ne lasi tion por la lasta momento. Tio faciligos la laboron de la Komitato. Unu el la plej malfacilaj aferoj, la loĝado de la kongresanoj, estas tute solvita de la Komitato, dank' al la helpo de la lokaj aŭtoritatoj, kaj malgraŭ tio ke Gijón estas somera stacio kaj sekve ĉeestata, dum la epoko en kiu la Kongreso okazos, de multege da familioj el pli sudaj partoj de la lando, la Komitato povas certigi la loĝadon al ĉiuj kongresanoj, kondiĉe ke oni aliĝu tuj. Pli poste, tio estos tre malfacila aŭ tute neebla.

Krom la aranĝoj specife esperantistaj de la Kongreso, oni ankaŭ povos ĝui la nur turismajn kaj interesajn allogaĵojn, kiel la folkloran feston kaj la agrablan ekskurson al la mirinda sanktejo de Covadonga.

---

# SALUTON!

Dum la lasta Hispana Kongreso de Esperanto, en Zaragoza, la Ĝenerala kunveno proponis novan estraron por H. E. F. La voĉdonado aprobis, per unuanimeco kiu pruvas la homogenan konsiston de nia hispana anaro, tion kion proponis la Ĝenerala kunveno. Hodiaŭ ni povas, fine, anonci al ĉiuj, ke la nova estraro estas laŭleĝe aprobita, kaj de nun ĝi ekfunkcias, plenumante tiel la deziron de la hispana esperantistaro.

Ĉiokaze, decas ke la postenuloj salutu la voĉdonintojn kaj danku al ili pro la granda honoro kiun ili ricevis. Kaj ankaŭ ke ili promesu labori efike kaj daŭre, por la bono de Esperanto kaj la disvastigo de nia paca idealo en Hispanujo. Per ĉi tuj mallongaj linioj, ili plenumas plenkore tiujn devojn, kaj esperas esti subtenataj dum la daŭro de la strebado, per la helpo kaj kuraĝigo de la tuta hispana esperantistaro.

Nia agado devas respeguli la klopodojn de ĉiuj. Ni devas esti, kaj fakte ni estos, viaj reprezentantoj. Niaj tutaj penoj estos tute ne efikaj se ili ne estas apogataj de via helpo kaj entuziasmo.

Tion ni esperas, por la plej glora disvolviĝo de nia kara lingvo kaj paca movado.

La Prezidanto, *D-ro R. Herrero.*

---

esperantistas de Gijón se está esforzando por que nuestra próxima conceatración sea un éxito y todos hemos de contribuir a conseguirlo con nuestra asistencia. Permítasenos, por tanto, insistir una vez más acerca de la conveniencia de que todo el que lo pueda hacer, no deje de acudir a nuestra próxima reunión, dándose cuenta de que la aportación de cada uno es necesaria para que todos logremos la meta deseada: el reconocimiento por todo el mundo, de la utilidad y la necesidad de un idioma común auxiliar para las relaciones internacionales.

# NOVAJ LIBROJ

*Recenzistoj esprimas ĉi tie siain proprajn juĝojn pri verkoj.*
*La Redakcio kaj la Estraro de H E F estas tute sendependaj de iliaj opinioj.*

**ROZOJ KAJ URTIKOJ,** de Poul Thorsen. 117-paĝa poemaro kun antaŭparolo de William Auld kaj vinjetoj de Borge Hamberg. Formato 13 x 21 cm. Eldonis: Komuna Konversacia Klubo, Randbolvej 4, Kopenhago F., Danlando. Akirebla ĉe Libroservo de Hispana Esperanto-Pederacio. Prezo: 65 pes.

La nomo bone trafas la enhavon: estas naivaj, romantikaj, emociaj verkoj, ŝatotaj de revemuloj kaj fraŭlinoj; kaj estas ankaŭ spicaj, pipraj, harditaj pecoj «nur por plenaĝuloj». La aŭtoro sendube plej ŝatas la satiran fakon, same en la tradukataj kiel en la originalaj poemoj; sed li ankaŭ plensukcesas en la filozofaj, emociaj aferoj.

La verko konsistas el du partoj: la unua enhavas 37 tradukojn el 17 aŭtoroj, el tiuj, 3 estas premiitaj en diversaj literaturaj konkursoj. Plejparte estas tradukoj de danaj verkistoj, sed ankaŭ de norvegaj kaj gronlandaj poetoj. En tiu parto, mi ne povas ne mencii la tradukojn de eskimaj kantoj, prezentitaj de la aŭtoro mem en prelego, en la Somera Universitato de Zagreb. Tie, unufoje ankoraŭ aperas la valoro de Esperanto por la diskono de la popoloj. Ni povas aserti ke ni neniam legus hispane eskimajn poemojn. Jen stranga literaturo, kiu per Esperanto venas al nia kono, kaj kies legado mi varme rekomendas al folkloristoj.

Strange ankaŭ estas ke, malgraŭ la malproksimo, kaj la tial malofta komuniko, du el la 37 tradukitaj kaj aliaj du el la 30 originalaj poemoj temas pri Hispanujo: ***Hispancj Knabinoj*** estas, laŭŝajne, popola marista kanto. Bedaŭrinde tiaj knabinoj estas iom laŭ la «Carmen» de Merimée. Kontraŭe, Kristensen, en poemo kies tradukon oni premiis en Valencio, juste laŭdas la landon kaj la heroon Don Kiĥoton. Mi profitas la okazon por notigi la malĝustan esperantigon de la nomo ***Mancha***, kies ekzakta sono estas ***Manĉa***, ne ***Manĥa***, kiel oni tradukis.

En la originala parto, estas 30 poemoj, kelkaj jam konataj de la hispanaj esperantistoj, ĉar aperintaj en nia Bulteno. La aŭtoro satire skurĝas, ridas kaj ridigas pri ĉio; sed kiam li seriozas, li scipovas eniri ĝis la koro de la leganto. Multe mi ŝatis tiaspekte ***Frua mateno en Sarajevo*** kaj ĉefe ***Fenestroj.***

La aŭtoro, instruisto kaj preleganto, estras la lingvon kaj trafas precize feliĉajn esprimojn: ***tra nigra ĝangalo betona.*** Li multe emas senperajn vortojn kaj —ve— ankaŭ neologismojn: ***trae, antaŭi, riĉo, juna ino, oldu nur la vino. Al mia kara fridigu la frunton.*** Kial ne la egalsilaba ***malvarmu?*** Sed pri tio oni ja sufiĉe verkis en antaŭaj numeroj de la Bulteno. Krome, la verko entenas paĝon de Vortklarigoj, fine de la libro.

Ankaŭ mi persone ne ŝatas la parencajn rimojn. Kiam malsamas la konsonantoj, niaj hispanaj oreloj, kutimiĝintaj al nacia ***romanco***, facile konsentas; sed se oni pretendas rimi nur per la konsonantoj, al ni tio sonas «ne verso». Agrable mi aŭdas: ***artifikas—balancigas, aglo—masakro—miraklo***, eĉ ***unu—suno***; sed kial rimigi ***kavaliron —bajaderon?*** En Esperanto, kiel en hispana lingvo, la vokaloj estras la vorton. Eble la aŭtoro nur pro eleganta senĝeneco neglektis tiujn rimojn. Kiu trafis unusilaban soneton kiel ***Kismiso***, ne povas trovi malfacilaĵojn en la versfarado.

Sed tiuj estas nur blanka nubpunkto en hela blua ĉielo. Mi vere rekomendas al ĉiu leganta esperantisto tiun belan libron, kies materia parto estas ankaŭ perfekta.

***A. Núñez Dubús.***

**JARLIBRO** de U. E. A., 1954, Dua parto, kun Matematika Terminaro, kaj kun resuma raporto de la progresoj de Esperanto dum la pasinta jaro. Liverata nur al Individuaj Membroj de U. E. A.

Ĝi prezentas liston de la kotizoj de U. E. A. por la jaro 1955, kun adresoj de la landaj ĉefdelegitoj; staton de la membraro en ĉiuj landoj en la fino de 1953; spezojn de la Asocio; financan raporton de la Akademio de Esperanto; raporton de la Estraro;

al la paĝo 180

# LA SONĜO

En malgranda nederlanda vilaĝo —Osterlittens— vivis iam ŝufaristo. La enloĝantoj de tiu vilaĝo sendube ne multe uzis siajn ŝuojn, ĉar nia ŝuisto devis pene labori kaj tamen restis malriĉa.

Iun nokton li havis strangan sonĝon. Voĉo diris al li:

—Iru al Amsterdamo kaj tie sur la Papen-ponto vi trovos trezoron.

La sekvintan matenon nia ŝulaboristo rakontis al sia edzino pri la sonĝo. Lia edzino —saĝa virino— nur respondis:

—Sonĝoj mensogas. Ne kredu pri ili.

Tamen la sekvintan nokton ree la sama sonĝo revenis; kaj eĉ trian fojon ĝi turmentis la edzon tiel, ke post forpaso de la nokto li diris al sia edzino:

—Mi iros al Amsterdamo, ĉar nun mi volas vidi ĉu mia sonĝo efektiviĝos!

Malgraŭ plendoj de sia edzino pri la multekosta vojaĝo, li forveturis al la ĉefurbo. Tie li trovis post unuhora promenado kaj pridemandado la ponton, kie li trovos sian feliĉon. «Eble mi nun estos riĉa» meditis la ŝufaristo. Sur la ponto tamen nenio eksterordinara estis videbla. Nur maljuna almozulo sidis tie, ludante akretonan violonon. Du tagojn la ŝuisto pasigis en la najbareco de la ponto. La trian tagon li decidis reveturi hejmen se nenio okazos. Sed ankaŭ la tria tago forpasis. Je la vespero la almozulo alparolis lin:

—Diru al mi, mia kara, kion vi serĉas tie ĉi? Vi migras sur tiu ĉi ponto jam dum tri tagoj. Ĉu vi atendas iun?

Nia malfeliĉulo rakontis pri sia sonĝo.

—Nu —komentis la maljunulo—. *Ne* kredu pri sonĝoj. Ankaŭ mi havis sonĝon. Mi sonĝis ke mi iru al Osterlittens. Tie malantaŭ la domo de ŝufaristo mi fosu sub fosto kaj mi trovos poton da oro! Sed ne kredu ke mi iru tien! Mi eĉ ne scias kie tiu vilaĝo kuŝas! Estu saĝa kaj iru hejmen!

—Ho jes, mi tuj iros hejmen —gaje respondis la ŝuisto kaj jam li estis for.

Hejmen veturinte li apenaŭ salutis la edzinon, prenis fosilon el la laborejo kaj fervore ekfosis sub la fosteto malantaŭ la domo. Kaj vere, post duonhora fosado, kupra kuirpoto kaptis la taglumon. Ĝoje la ŝuisto konstatis ke la enhavo konsistas el oraj moneroj. Kompreneble lia nekredema edzino partoprenis lian feliĉon. La monon ili transportis al la plej proksima urbo kie juvelisto rekompence donis al ili multe da banknotoj. Nun feliĉaj tagoj alvenis por nia ŝuisto kaj lia familio. La poton li purigis kaj pendigis super la fajrujon.

Iun tagon la pastro venis viziti lin kaj vidis la malnovan kaldronon. La pastro ŝatis tiajn antikvaĵojn kaj demandis:

—De kie venas tiu poto?

—Mi aĉetis ĝin en vendejo —ruze respondis la ŝuisto, ĉar li ne volis malkaŝi la sekreton de sia neatendita prospero.

La pastro, rigardante la poton de pli proksime, vidis fremdlingvan surskribon parte forviŝitan pro la tempo.

—Aĥ —li diris— mi legas latinan surskribon sur tiu ĉi poto. Tre strange! Jen mi legas: «Sub tiu ĉi poto kuŝas alia». Mi ne komprenas tion. Ĉu vi?

—Ne, ankaŭ mi ne komprenas —gaje respondis la ŝuisto.

Post la foriro de la pastro, dua persono forlasis la domon. Estis la ŝuisto kiu rapide iris al la laborejo, prenis fosilon kaj denove faris truon sub la fosto —kaj vidu— jen dua poto! Ankaŭ tiu estis plena je oro. Nun la ŝuisto kaj lia edzino estis riĉaj.

Anstataŭ la ligna fosto la ŝuisto metis ŝtonan sur la lokon, kie li trovis oron... kaj feliĉon. Mi ne scias ĉu tiu ŝtona fosto ankoraŭ staras en Osterlittens, sed la historio montras al ni ke:

Sonĝoj povas realiĝi. Kaj ankaŭ estas fakto ke ni ofte serĉas la feliĉon malproksime, dum ĝi kuŝas apud nia domo. Ni nur eklaboru por trovi ĝin!

*J. C. van Twuiver* (Laŭ popolrakonto)

## ¡Errando se aprende a herrar!

En Barcelona, y bajo los auspicios de diversas Sociedades: «La Hormiga Martinense», Unión Cooperativista Barcelonesa, Parroquia de San Juan Bautista, Cooperativa La Vanguardia Obrera, Organización Nacional de Ciegos y «Stelo de Paco», acaban de verificarse exámenes de capacitación esperantista, habiendo logrado aprobar los siguientes aspirantes: J. L. Aldeguer Jaén, V. Bartumeu Rovira, Pablo Claramunt Gilabert, Martín Calm Noguer, Marta García Picó, Pedro Nuez, Adela Gomila Sintes, Ramón García Picó, Isidro Berniol de Yebra, Francisco Palanques Gozalbo, Juan Miguel Aznar Morales y Antonia Jové Figols. Nuestra enhorabuena a todos.

Como de los errores se aprende, creemos conveniente publicar los temas y sus traducciones correctas, como también los errores más frecuentes en que se ha incurrido. He aquí los ejercicios:

1.º Cuanto más bebo, menos sed tengo.
Ju pli mi trinkas, des malpli mi soifas.

Algunos pusieron ***des pli*** delante de ***ju pli***. Para regla mnemotécnica acuérdense de que ***des pli*** debe ir des-pués.

2.º Él cobrará el séxtuplo que yo.
Li enspezos la sesoblon ol mi.

3.º Carlos y su novia riñeron ayer.
Karlo kaj lia fianĉino kverelis hieraŭ.

Se equivocaron los que tradujeron ***sia*** fianĉino. Solo puede traducirse ***sia*** cuando se refiere al complemento de un sujeto en tercera persona, y aquí ***fianĉino*** es sujeto y no complemento.

4.º Él le pidió sus cartas y ella sus retratos.
Li petis al ŝi siajn leterojn kaj ŝi siajn portretojn.

En esta frase, tanto ***li*** como ***ŝi*** son sujetos en tercera persona, cuyos complementos ***leterojn*** y ***portretojn*** exigen el ***sia.***

5.º Entonces, él cogió sus regalos (de ella) y se los devolvió.
Tiam, li prenis ŝiajn donacojn kaj redonis ilin al ŝi.

En esta frase no se puede decir ***siajn donacojn,*** puesto que los regalos no eran de él (sujeto en tercera persona), sino de ella, que no es sujeto de la frase.

6.º Mientras cuento el dinero, cuéntame cómo lo ganaste.
Dum mi kalkulas la monon, rakontu al mi kiel vi gajnis ĝin.

En Esperanto, contar (calcular) es ***kalkuli,*** y contar (referir) es ***rakonti.***

7.º En el atardecer los murciélagos revolotean.
Dum vespero (vespere) la vespertoj flirtas.

Quienes tradujeron ***flirtflugas*** cometieron una redundancia perdonable.

8.º Él rompió el cenicero en mil pedazos, por descuido.
Li frakasis la cindrujon je mil pecoj, pro malatento.

Pocos usaron ***frakasis,*** que traduce mejor «romper en pedazos». No se debe traducir ***malatente*** ni ***malzorge,*** sino ***pro malatento*** o ***pro malzorgo,*** pues el ***pro*** indica que la causa fué por ***malatento*** o ***malzorgo;*** no «con descuido», sino «por descuido».

9.º El tiempo está lluvioso. Hacía tiempo que no llovía.
La vetero estas pluva (pluvema). De longe ne pluvis.

Es grave falta traducir ***la tempo,*** que indica la sucesión de años, horas, minutos, etcétera, pero no el estado atmosférico con sus alteraciones. Así, debemos traducir:

Mientras el tiempo está nuboso, el tiempo parece más largo.

Dum la vetero estas nuba, la tempo ŝajnas pli longa.

Bastantes aspirantes tradujeron «***ke***» ***ne pluvis.*** Ese ***ke*** es cosa de giro español, que no debe traducirse en Esperanto.

10.º Ella anotó lo que le dije, pero no notó lo que tú hiciste.
Ŝi notis tion kion mi diris al ŝi, sed ŝi ne rimarkis tion kion vi faris.

No es lo mismo anotar (tomar notas), que notar (darse cuenta).

11.º Ili perdis la deserton en la dezerto.

los perdieron el postre en el desierto.
Ili ludis gravan rolon, sed ili ne ludis tiun verkon.
Ellos desempeñaron un importante papel, pero no representaron esa obra.

En Esperanto, *ludi*, entre otras cosas, significa jugar, tocar un instrumento musical, representar una obra de teatro, desempeñar un papel en una acción u obra.

13.º Laŭ viaj agoj vi estos juĝataj.
Según vuestras acciones, seréis juzgados.

14.º Li malpurigis sian kitelon purigante la sitelon.
Él ensució su blusa limpiando el cubo.

El resultado de estos exámenes ha sido muy satisfactorio, ya que, incluso aquellos que no alcanzaron la puntuación necesaria, demostraron por lo menos suficientes conocimientos para esperar que, en otra ocasión, alcanzarán el codiciado trofeo. La fórmula mágica para triunfar se llama: PERSISTO!

*Dr. Rafael Herrero.*

## LERNU TRADUKANTE

***Inter la sendintoj de korektaj tradukoj ni distribuos premiojn, laŭ samaj kondiĉoj kiel por la enigmoj.***

Sendis tradukojn de la tasko de Marto jenaj gesamideanoj: M. Ruiz Maza, L. Santamarina, Baska Esperanto-Rondo, Rodolfo Canet, A. Madriles, A. Núñez Dubús, A. Candela, R. Albero, F. Lledó, E. Pons, M. Vallés, E. E. Yelland, J. Anguita, V. Monsalve, S. Roca, M. Fernández Méndez kaj J. A. Daniel. Atingis la 10 poentojn S-ro E. E. Yelland, kaj ni sendas al li la premion.

***Jen la plej korekta traduko de la sama tasko:***

Mi skribis al mia patro, petante al li permeson por daŭrigi sola mian vojaĝon tra Italujo, kaj, sen atendi la respondon, kiun mi jam timis nea, mi decidis anticipe malobei. «Tial, se la malpermeso alvenos —mi diris al mi—, ĝi alvenos malfrue. Estos admono, sed mi estos pardonata. Mi revenos al la ŝafejo, sed, dume, mi jam estos vidinta kion mi deziris». Mi kalkulis miajn monrimedojn, tre limigitajn; sed mi rememoris, ke en Napolo loĝas parenco de mia patrino, al kiu mi povus pruntepeti monon por mia reveno. Kaj profitante belan nokton, mi eliris el Livorno, en la poŝtvagonaro, en direkto al Romo. Tie mi pasigis la vintron, sola, en malgranda ĉambro de malluma strateto, kiu alfluas al la Hispanujo-placo, ĉe roma pentristo, kiu havis la ĝentilecon akcepti min kvazaŭ familianon.

***Jen nova tasko. Peco de la romano «Tú eres la paz», de G. Martínez Sierra:***

**He aquí que a mitad de la escalinata, esa misma música que íbamos evocando nos sale al encuentro: por las puertas-ventanas de un salón, que están abiertas de par en par, vienen los sones de una sonata: el palacio encantado da la bienvenida melodiosamente. ¿Qué imagen evocáis para dueña y señora del salón, al son de aquella música? Sin duda, una mujercita en la primavera del vivir, acaso vestida de gris o de blanco, seguramente con aristocráticas manos, que son como pájaros de ámbar y rosa sobre el blanco y negro marfil de las teclas, con ojos que al compás de la sonata van dando luz a un sueño, con labios que sonríen al sueño que los ojos están soñando, y luego se entreabren para beber ávidamente el aire tibio que entra del jardín. Si, esta tarde, en esta tarde, en esta hora, con esta luz, en esta primavera, parece que sólo una mujer joven y un poco poeta puede estar desgranando esta sonata dentro de este palacio maravilloso.**

## Al la Hispana Esperantista Gejunularo

Ni entreprenas la reorganizadon de Tutmonda Esperanto Junular-Organizo en nia lando. Se ni trovos sufiĉan apogon, kaj certe ni trovos, ni starigos en Hispanujo T. E. J. O.-Sekcion, kiel junularsekcion de la Hispana Esperanto-Federacio. Nun ni nur peras aliĝojn al la Organizo; la jarkotizo estas tre malalta kaj la monatorgano *La Juna Vivo* tre leginda kaj amuza.

Al la laboro por la plej atentinda Esperanta Organizo!

*Esperanto-Grupo Moyá*
str. Forn, 19 - MOYÁ (Barcelona)

*CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA*
**Forn, 19 — MOYÁ (Barcelona)**

# HISPANA KRONIKO

*VALENCIA.* 29/4 D-ro J. Borrás, fama ĥirurgo kaj poligloto, prelegis pri la temo «Kelkaj konsideroj pri lingvoj». Kiel konscia ĥirurgo, li sekcis tre detale kelkajn aspektojn de multaj lingvoj, reliefigante la mallogikon kiu regas ilin, kaj montris ke la homaro ne povas malŝpari tiom da tempo, lernante plurajn lingvojn. Sciencistoj penas por korekti la naturon kaj prilukti la malsanojn; tamen, sub la lingva vidpunkto, kontraŭe, la nacioj klopodas por malprogresi kaj diferenciĝi, komplikante tiel tiun gravan aspekton de la vivo. D-ro Borrás pruvis la bezonon de komuna idiomo kaj refutis la eraran ideon, ke produkto de laboratorio ne povas esti taŭga, ĉar la laboratorioj produktis nenombreblajn kuracilojn, kiuj pruviĝis tre efikaj kaj same lingva laboratoria produkto povas vivi kaj utili. «Por forigi la lingvokonfuzon, kiu tiel malutilas la homaron, dispeciĝante ĝin, estas tute necese, ke nova tagiĝo havigu al ni la ĥirurgon, kiu entreprenos la lingvan protezon, pere de universala lingvo», diris D-ro Borrás, kiu asertis ke Esperanto estas la vera kaj unika solvo por la lingva problemo, kvankam li mem ne estas esperantisto, sed multe simpatias kun ĝi. La prelegisto estis varme aplaŭdata kaj gratulata de multaj aŭskultantoj.

*BARCELONA.* La Esperanto-Grupo «Stelo de Paco» 19/5 faris feston honore al franca karavano el inĝenieroj kaj teknikistoj de grava pariza uzino. Al tiu festo estis invitataj la aliaj barcelonaj grupoj kaj paroladis S-roj Claramunt, Gisbert, Gómez, Lautenbach (germano vizitanta la urbon), inĝeniero R. Watier (prezidanto de la karavano kaj de la E-Grupo de la pariza uzino) kaj la prezidanto de la kooperativo de Manteksistoj. Ciuj paroladoj pritraktis praktikajn aspektojn aŭ informojn pri Esperanto. Ĉeestis belgaj fraŭlinoj M. L. Roose kaj M. Smets, kaj brita sinjorino I. Myers, ĉiuj en turisma vojaĝo. Okazis honora vintrinkado kaj disdono de diplomoj al la jus ekzamenitaj lernantoj pri esperanta kapablo. La 20/5 niaj francaj geamikoj vizitis elektran centralon kaj la stacion de la Nacia Radio de Hispanujo, kie okazis intervjuo tra la mikrofono. La intervjuo estis en Esperanto kaj interpretisto S-ro Aldeguer klarigis en hispana lingvo. Do ĉi tio estis tre valora por la propagando. La 21/5 okazis ekskurso al la mondfama monto Montserrat kaj la saman tagon la karavano reveturis al Parizo, lasante en nia urbo la postsignojn de sia simpatio.

*SABADELL.* 12/4 en la festsalono de Kooperativo «La Sabadellense», ĝia Esperanto-Sekcio aranĝis ĥoran koncerton kun piano-akompano, kiun majstre prezentis en agrabla programo la urba kantsocieto «La Lírica Sabadellense». Baritono S-ro López surprizis la ĉeestantojn per bona kantado de ario el «La Tempestad» laŭ la Esperanto-traduko de la veterana klubano S-ro Esteve. En la fino, post kunkantado de «La Espero», la Prezidanto de la Esperanto-Sekcio S-ro Ramón Manau donacis, nome de la Sabadella esperantistaro, verdstelan rubandon por la standardo de la menciita ĥora societo.

*MOYÁ.* Okaze de la fino de la Esperanto-kursoj la loka klubo organizas feston por la 5/6, al kiu estis invitataj la samideanojn el Barcelona, Sabadell, Tarrasa, San Feliu de Codinas k. a. Kolektivan vojaĝon en aŭtobuso organizas la agentejo «Viajes Marco» kiel unuan ekskurson de sia serio «Turismo kaj Esperanto».

*TARRASA.* Esperanto-Fako de la S. C. Juventud Tarrasense aranĝis prelegon pri Astronomio, de S-ro R. Casanova, kun lumbildoj; preparan kunvenon por la vizito al la Hispana Kongreso; preparan kunvenon por la vizito al la Universala Kongreso kaj ekskurson al S. Mus kaj «Can Roig».

---

Tutmonda Esperanto Junular-Organizo (T. E. J. O.)
Monata organo: «La Juna Vivo»
Jarkotizo: 30 pesetojn
Peranto: **Esperanto - Grupo Moyá**
**MOYÁ** (Barcelona)

BOLETIN de la
FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA
BULTENO
DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Str. Pelayo, 7, 1.ª - VALENCIA

# DIVERSAĴOJ

*Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta solvon de enigmo, gajnos unu poenton. Gajnintoj de 10 poentoj ricevos libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 1-a de Julio.*

Ni ricevis la solvon de la enigmo n.° 17 el jenaj gesamideanoj: E. Miralles, A. Candela, M. Fernández Méndez, J. A. Daniel, A. Escamilla, P. Naranjo, S. Roca, V. Monsalve, R. Albero, A. Núñez Dubús, M. Ruiz Cubiles, M. Pilloy, A. García Gómez, J. M. Fonteuberta, Baska Esperanto Rondo kaj J. Pérez Sempere.

SOLVO DE LA ENIGMO N.° 17

*Horizontale:* 1 Aglo, Bros. 2 Indiferenta. 3 La, Armil, El. 4 Eks, Obl, Tre. 5 Orel, Aren. 6 Oligarkio. 7 Inim, Sama. 8 Dis, Buŝ, Seĝ. 9 Es, Teras, Ti. 10 Ambulancaro. 11 Oara, Ĝiri.

*Vertikale:* 1 Ileo, Idea. 2 Anakronismo. 3 Gd, Sèlis, Ba. 4 Lia, Lim, Tur. 5 Ofro, Bela. 6 Embrazura. 7 Bril, Ŝanĝ. 8 Rel, Aks, Sci. 9 On, Trias, Ar. 10 Stereometri. 11 Alen, Aĝio.

ENIGMO N.° 19

Krucvorta enigmo, de Juan Devís.

Sama figuro de antaŭaj numeroj.

*Horizontale:* 1 Ne akompanata, (Inv) Liberigi iun el grava danĝero. 2 Specialisto pri konstruado de maŝinoj. 3 Sufikso. (Rad) Skribsigno de nombroj. Prefikso. 4 Malgranda. Pref. (Rad) Malplenaĵo. 5 Metala ronda najlo. Laŭ ĉia maniero. 6 Milono de gramo. 7 Konsekre. Prep. montranta tempon pli malfruan ol alia. 8 Sufikso signanta ujon por unu objekto. (Rad) Norda cervo kun larĝaj kornoj. (Rad) Glitilo. 9 Sufikso. Tiel estu. Komparativa konj. 10 (Rad) Metodo de kuracado per radioj. 11 (Rad) Nenormala ofta eligado de fluaj ekskrementoj. Speco de forta hundo.

*Vertikale:* 1 (Rad) Esprima aspekto de la vizaĝo. (Rad) Trinkaĵo el ordeo k lupolo. 2 (Rad) Havanta romanecan sentemon. 3 Numeralo. (Rad) Trafi ion celitan. Nombra prep. 4 (Rad) Sentanta sin malvigla. (Rad) Grasa fluaĵo. (Inv) Ekkria k demanda adj. 5 (Rad) Principo de la sentoj k pasioj. Ŝatos kare iun. 6 (Inv) Per aparato optika aŭ elektra transsendi sciigojn ĝis granda distanco. 7 (Inv) Ŝovi la langon sur io. (Rad) Premante k kirlante miksi farunon k akvon. 8 (Rad) Animalo de sekso kontraŭa al ino. (Rad) Kapvesto. Metalo. 9 Verba finaĵo. Sentos minacantan danĝeran impreson. (Rad) Labori. 10 Optika instrumento per kiu oni vidas reliefe la bildojn. 11 (Inv) Ronda ŝipkajuta apertureto. (Rad) Arbo kies floroj oni uzas por fari kvietigajn infuzojn.

ENIGMO N.° 20

LERTA NODO de V. Monsalve.

Oni prenas iom grandan poŝtukon per du ekstremoj kaj demandas ĉu oni povas fari nodon sen ellasi la ekstremojn. Ĉu estas eble?

---

el la paĝo 175

raporton de la Centro de Esploro kaj Dokumentado; spezojn de C. E. D.; resumon de raportoj de Landaj Asocioj kaj fine *Matematikan Terminaron.* Por mi estas la plej interesaj allogaĵoj de la duaj partoj de la Jarlibro de U. E. A. ĉi tiuj terminaroj, per kiuj nia internacia Asocio ĉiujare regalas nin. La aŭtoro de la Matematika Terminaro estas S-ro C. M. Bean, B. Sc., Ph. D., F. R. I. C. kaj li tre bone pruvis sian kompetenton per laboro, kiun oni ne sufiĉe povos danki kaj pro kiu mi tre sincere gratulas lin. Ĉi tiuj fakaj terminaroj estas tre utilaj kaj necesaj, kaj estas granda avantaĝo ke ili estas eldonitaj aparte kaj ne miksitaj en la ordinaraj vortaroj, ĉar ja ilia utilo estas ekskluziva por la koncernuloj kaj ne interesas al la ordinaraj uzantoj de vortaro. Tamen mi, kvankam apartenanta al ĉi tiu lasta speco, emas kolekti ĉiajn terminarojn.

Tial ke la recenzita Jarlibro estas nur liverata al membroj de U. E. A., oni kun tre bona decido eldonis la *Matematikan Terminaron* en aparta libreto 40-paĝa, por ke ĉiu esperantisto senescepte povu ekhavi ĝin. La prezo de la terminaro sola estas 10 pesetoj ĉe nia Libroservo.—*J. Bosch.*

PERIS-G. VÍA M. TURIA, 28-VALENCIA

EL IDIOMA INTERNACIONAL AUXILIAR

# ESPERANTO
# AL ALCANCE DE TODOS

VULGARIZACIÓN DE GRAMATICA ESPERANTO-ESPAÑOLA

POR

FERNANDO SOLER VALLS

JEFE DE ADMINISTRACIÓN DE TELÉGRAFOS, JUBILADO
EX-INSPECTOR GENERAL DE TELECOMUNICACIÓN
EX-PRIMER TENIENTE DE LA ESCALA ACTIVA DE INFANTERÍA
MIEMBRO DEL INSTITUTO ESPAÑOL DE ESPERANTO, ETC.

**Obra premiada con MEDALLA DE PLATA en la Exposición de Valencia de 1909**

## QUINTA EDICIÓN

NOTABLEMENTE MEJORADA

CON UN FORMULARIO DE CARTAS EN ESPERANTO Y EN ESPAÑOL

**Precio: 15 PESETAS**

VALENCIA - 1954

IMPRENTA Y LITOGRAFÍA VIUDA DE MIGUEL ZAMIT
Caballeros, 16

Valencia, ............de ........................................ de 1954

*Sr. D.* ........................................................................

........................................................................

Muy Sr. mío.

Las relaciones entre todos los países del mundo se han acrecentado en los últimos tiempos de tal modo, gracias a las facilidades que la ciencia ha puesto en manos de los hombres para resolver el problema de la locomoción, que cada día se siente más la necesidad de un idioma internacional auxiliar para la fácil intercomprensión, hablada y escrita, entre todos los habitantes.

Tal idioma existe ya desde 1887, y es el ESPERANTO, debido al genial invento del doctor polaco, *Luis Zamenhof*, oculista en Varsovia, ilustre filósofo, conocedor de casi todos los idiomas cultos, de los que extrajo la esencia y fundamentos para la formación de su maravillosa lengua internacional.

Una de las obras para su más fácil estudio a los ciudadanos de habla española, de la que se han agotado ya cuatro ediciones, ha sido la titulada «EL ESPERANTO AL ALCANCE DE TODOS», cuya portada figura al respaldo, viéndose obligado el autor a poner en prensa la **5.ª edición,** por el sin número de peticiones recibidas de toda España y América latina, nueva edición que tengo el honor de ofrecer al público, al precio de propaganda de **15 pesetas** ejemplar, concediéndose además importantes descuentos con el fin de facilitar la creación de Grupos Esperantistas en todos los pueblos. El importe de los pedidos deberá remitirse por Giro Postal o contra reembolso.

Las librerías gozarán del descuento y condiciones especiales para la venta en depósito.

Confiando en verme favorecido por el público, cuyos pedidos deberá formularme cuanto antes, a fin de tener preparadas las remesas oportunas, le saluda, agradecido, muy atentamente,

*El Autor*

---

PUNTOS DE VENTA:

En las principales Librerías y Kioscos de España y América, y en los siguientes:

VALENCIA: En casa del autor, Avda. José Antonio, 58 - Teléfonos 54339 y 72684.
En la Federación Esperantista Española, Ruzafa, 7, bajo

---

DEL MISMO AUTOR:

# ELEMENTOS DE ESPERANTO

Curso destinado a las Escuelas de 1.ª Enseñanza

2.ª edición — **2 pesetas**

**Obrita muy recomendable para la propaganda entre la juventud**